


# Ateismo

*Bulteno de Ateista Tutmonda Esperanto Organizo*

<http://www.gazetoteko.com/ateo/ateo1.htm>



*Raporto pri nia telaviva  
rekreo.*

**N° 1** (de la nova epoko)

**Julio 2001**

## Redaktore:

### Rekreo.

Antaŭ ok jaroj kunvenis en la Universala Kongreso de Valensio (Hispanio) pli ol dudek homoj, kiuj decidis puŝi nian asocion, kreante ĝin denove, se bezonate. Ni eĉ kolektis monon, sed finfine ni interkonsentis restarigi la tiam ekzistantan asocion.



Jaroj venis kaj iris, kaj nenion novan ni aŭdis pri ATEO. Antaŭ du jaroj, en la Kongreso de Berlino, ni kunvenis en koridoro, ĉar la stagnado estis tiel evidenta, ke UEA ne konsideris doni al ni budon aŭ kunvenejon. Estas ironie, ke en religia lando Izraelo, ni finfine atingis budon kaj kunvenejon. Mi devas aldoni, ke tio estas danke al la zorgo kaj strebado de Claude Nourmont, kiu ree mesaĝadis al Prezidanto Ralph Dumain kaj al mi mem. Frukto de tiu interparolado estas la restarigo de nia asocio nun. En Tel Avivo ni informis la interesatojn pri nia restarigo, kaj ĉirkaŭ tridek homoj kunvenis kaj parolis pri nia restarigo. Ni ankaŭ elektis vakajn postenojn organizajn en nia asocio. Pola Radio poste informis pri la afero, do eble multaj el niaj malnovaj membroj nun scias pri ni.

Sed tio ne sufiĉas. Asocio kiu ne kunvenas, kiu ne laboras cele al difinitaj taskoj, estas mortonta asocio. Ni sukcesis malveki nun, sed ankoraŭ ni devas prilabori kaj difini niajn taskojn kaj interkonsenti pri nia agado. Tio estu laboro por la nova estraro de ATEO.

Alia problemo estas la enhavo. Mi atendas kontribuojn de vi ĉiuj. Ateistoj estas nekonformistoj, do vi ĉiuj eble havas multon por diri al ni aliaj, kaj verŝajne estos reagoj al kontribuajfojoj antaŭaj. Mi esperas, ke la artikoloj estos altkvalitaj kaj bone rezonataj, sed se ne, ni ankaŭ legos kaj publikigos ilin. Se estas lingvaj problemoj, mi klopodos korekti ilin, kaj prezenti al vi ĉiuj poluritajn kaj klarajn versiojn, kompreneble antaŭe interkonsentite de la aŭtoroj, se eblas. Sed mi ne ŝatus, ke nia magazino estu kontraŭparoha flugfolio. Oni perforte kredigas homojn, kaj necesas, ke oni uzu sian plej delikatan ilon, bone funkciantan cerbon, por forlasi la puton de timo, perforto kaj minaco sur kiu religio bazas sin.

Nia bulteno ne estas tre longa ĉi foje. Ni volas restarigi ĝin, eĉ se ne brile, por ke dum la Kongreso de Kroatio oni sciu, ke ankoraŭ ni estas viva asocio. Tio, kiom da tempo tio daŭros, dependas sole de ni ĉiuj, la anaro. Ne gravas la revuo, gravas la asocio. Ne gravas la asocio, gravas la ago. Ne gravas la ago, gravas, ke ĝi estu utila.

Mi esperas, ke la venonta eldono de **Ateismo** enhavos artikolojn verkitajn de pli da anoj de la asocio. Ni malstagnu, por ŝanĝo saniga.

## Enhavo

Redaktore .....	2
Kio estas religio? .....	3
Eseo pri l'ABC de raciismo .....	4
Ĉu socia fuŝo aŭ pensakuŝo? .....	8
Maskoj falis .....	9
Kontraŭ eklezio! .....	10
La celoj de ATEO .....	11
Manĉeto kaj informoj .....	12

# KIO ESTAS RELIGIO?

*de Andriú Lorulot*

La demando povas □ajni senutila. Sed ekde kiam oni ĝin atenteme ekzamenas, oni ekvidas ke ĝi entenas multe da obskuroj.

Estas multe malfacila renkonti ĉe la aŭtoroj (kredantoj aŭ ne) difinojn vere precizaj kaj kontentigaj de religio.

La etimologio diras al ni, ke religio (*religare*, tio kio ligas) ne estas alia afero ol *ligo*. Duobla ligo, kiu ligas la homon al sia Dio, unue ĝi kiu ligas la homojn inter si, poste, ĉirkaŭ sama kredo.

Ĝia ajn estu la vidpunkto kie oni lokigas, oni devas konsenti ke tiu difino estas malsufiĉa.

<<Ligo inter la homo kaj Dio>>, oni diras, sed oni ne difinas Dion kaj konsekvence, la ideo de religio ripozas sur neniom solida.

<<Ligo kiu arigas ĉirkaŭ komunaj kredoj ian nombron da homoj>>, oni diras ankoraŭ.

Sed ĉu tiu difino ne estus tro larĝa? Oni kutime parolas pri <<socialisma religio>>, aŭ pri <<religio anarĥisma>>, de <<religio vegetarana>>, <<monarkia>>, <<arta>>, kion mi scias ankoraŭ? Ĉu tioma pligrandigo de tiu termino ne estas troa? Politika partio, tiom dogma ĝi estu, ne estas religio. Filozofia sekto aŭ alia, ĝi estu impregnita de troa mistikismo, ne nepre konsistigas religion, kiel ni ĝin elmontros.

Tolstojo citas ian nombron da difinoj. Ekzemple, tiun de Gobleto Dalviela (Goblet d'Alviella): <<La religio estas iu maniero por la homo realigi sian rilaton antaŭ la superhomaj kaj misteraj fortoj de kiuj ĝi kredas sin dependa>>. Tiun de Vaŭvenargo (Vauvenargues): <<La devigoj antaŭ Dio, jen la religio>>. Sed Tolstojo proponas difinon pli kompleta: <<La vera religio, es-

tas, konforme al la racio kaj la scio de la homo, la rilato establita far li antaŭ la senfina vivo kiu lin ĉirkaŭas, kiu ligas ĝian (la homan) vivon kun tiu senfino kaj lin gvidas en ĝiaj agoj>> (1).

Burnufo (Burnouf) precizigas, prave laŭ mi, ke la persona kaj intima koncepto de Dio, ne sufiĉas konsistigas religion (2).

Ne estas temo en la mondo pli debatita ol tiu de la religio, kaj Frazero (Frazer) konfesis ke la difino estas preskaŭ nebla. Li tamen proponas la sekvanta: <<Per religio ni komprenas la favorigo aŭ la repacigo de potencoj superaj al la homo kiuj, oni kredas, kondukas kaj regas la vojiron de la naturo kaj de la homa vivo>>.

Estus do, en ĉiu religio, du distinktaj elementoj: teoria elemento (kredo je supera potenco); praktika elemento (strebo por favoriĝi al si la ĉi potenco).

(1) Ĉio estas religio? (Qu'est-ce que la religion?) p. 16.

(2) La Scienco de la Religioj (La Science des Religions).

Burnufo, antaŭ Frazero, jam specifikis ke ĉiu religio necese devas enhavi dion kaj riton - unu kompletanta l' alian. Ĉu la katolika Eklezio mem ne establis ĝian teologion sur la konekzistado de la kredo kaj de la laboroj, unu tiom necesa kiel la aliaj, kiuj de tio rezultiĝas?

<<La religio, diris Georgo Matisa, estas sistemo de kredoj rilate al la origino de la mondo, al la fenomenoj de l' universo kaj al la sorto de la homo, de kolektivaj ritoj kaj de individuaj gestoj, finfine de parolaj formuloj, ofte akompanitaj de aparta emocio, iaspeca sentimentala antaŭenmoviĝo.>> (1).

Durkejo (Durkheim) siaflanke diros: <<Religio estas solidara sistemo de kredoj kaj praktikoj rilataj al sanktegaj aferoj, tio

Daŭrigas en paĝo 7-a

## Eseo pri l'aboco de l'raciismo<sup>1</sup>

de D-ro J. Valois<sup>2</sup>

Kvin nocioj estas fundamentaj:

1. - La leĝo de Lavuázio (Lavoisier) formulas: *Nenio perdiĝas, nenio kreiĝas* (komence de neniado), ĉio transformiĝas.

Do la materio ne povis esti kreita kaj, kiel ĝi ne povas havi finon, ĝi estas eterna. Sekvas ke al ni estas science malpermesita serĉi iun originon al la materio. Demandoj:

a) Kial la materio ekzistas? Ni tion ne scias.

b) Kial la plus-signo altiras la minus-signon kaj do kial la materio sen-ĉese transformiĝas? Ni tion ne scias kaj ni devas malkontesti ke ĉiu materio estas inteligenta, tio estas, laŭ la difino la plej plikonata, ke ĝi kapablas adaptiĝi, evolui, transformi kaj do krei komence de la elementoj kiujn ĝi disponas.

Se la raciisto ne povas respondi al du demandojn, la diisto malkapablas respondi al multe pli granda nombro de demandadoj.

Ekzemplo: kial Dio ekzistas? ĉu ĝi inteligentas, kreis la materion kaj la spacon kaj kiel, kiumomente, kun kio, kie ĝi estis kaj kion ĝi faris antaŭ ol krei la spacon, kie li loĝas nun, el la spaco aŭ apude? ktp.

Plie, la respondoj donitaj far la diisto kontraŭdiras la sciencajn leĝojn kaj li havas, krome, logikon komparebla al tiu

de la juĝistoj, tiaj kiaj ili estas priskribitaj far Lafonteno (La Fontaine), ĉar li ne hezitas pravigi sian kredon per frazoj absolute kontraŭaj. Ekzemplo: <<ĉio kio estas eksplikebla provas la ekziston de Dio kaj ĉio kio neeksplikeblas - la misteroj, la mirakloj, ktp. -ankaŭ provas ĝian ekziston!>>.

2. - La spaco: *Ĝi entenas ĉion, kio ekzistas kaj ĝi estas senfina* ĉar - malkontesti ke ĝi estas limigita, neeviteble estas akcepti ke alia spaco ĝin ĉirkaŭas.

-H. Riosa (Hubert Reeves), kiu estas modera astrofizikisto, skribis: *La matematikaj modeloj sugestas ke la Universo estas probable senfina.*

Kiel la materio eternas, ties ujo ankaŭ estas kaj, kiel ĝi transformiĝas senĉese, la spaco ĉiam modifiĝas, en la maniero de ĉambro varias se oni movas la aĵoj kiujn ĝi entenas. Kaj konsiderante ke la spaco estas senfina, la materio - elemento de la Universo - estas ankaŭ tia.

3. - La tempo: *Ĝi mezuras la intervalon kiu disigas almenaŭ du statojn malsamajn kaj sekvajn, tiuj statoj povantaj okazi en iu sama punkto de l'spaco.* Se nenio transformiĝus, la tempo ne ekzistus, sed kiel ĉio evoluas sen-ĉese, la tempo estas ankaŭ ĝi eterna kaj senfina.

4. - *La vero estas tio, kio estas konstatabla formulis multaj sciencistoj kaj filozofoj inter kiuj Klaŭdo Bernarda (Claude Bernard). La vero estas do tio, kio estas kontrolebla per la scienco, per l'eksperimentado.*

<sup>1</sup>Unue publikigita en *La Raison* (la prudento) n-ro 341 en junio de 1989.

<sup>2</sup>Elfrancigis Marteno Lavalea.

Tiele estas permesita imagi Pinokjon, sed ni ne povas kontroli ĝian ekziston, kio pruvas, i.a., ke la ekzisto de iu vorto ne signifas tiun de kio ĝi supoze reprezentas.

Kiel oni vidas tion, tiu nocio kaj la tri antaŭaj ebligas atribui al la materio, al la spaco, kaj al la tempo a-vortojn kiujn la diisto investas, sen-pruve al iu diaĵo.

Kompreneble ĉiu estas libera nei ke du kaj du faras kvar kaj do nei la tri eternajojn atestitaj far la scienco. Sed ni daŭru.

5. - Ĉio transformiĝas ĉiame. Same kiel la kreaĵoj de l'homo, tiuj de la naturo efektiviĝas senĉese. Tiel ni ĉeestas niaepoke la transformadon de nia planedo kaj la kreon - l'aperon - de AIDESO. Plie ni scias ke pluraj specoj dirataj vivoantaj malaperis kaj ke post 500 milionoj da jaroj, la homo ne plu ekzistos sur la Tero tial ke la temperaturo atingos 200 C., de kie la neeblo de ĉia vivo. La homa animalo do okupontos nian planedon kvin fojojn malpli da tempo ol la aliaj animaloj kaj ok fojojn malpli ol la vegetaloj...



Tiuj faktoj nepre kontraŭdiras la dogmojn kiuj asertas ke la evoluado efektiviĝas al la plejbono kaj ke la homo estas la fina celo de l'diaj kreaĵoj. Nur sensenculo povas ignori AIDESON kaj aserti ke la Tero estis kreita por la homo. Pri tiu temo, ni notu ke por la Eklezio la ino estas malpli valora ol la viro, ĉar i ne estas laŭ la

ekzakta bildo de Dio, de kie rezultas ke ĝi ne povas pastrigi kaj ke la **Dictionnaire des confesseurs** (Vortaro de l'konfesprenantoj) indikas ke la vira feti havas animon komence de la 3a monato kaj tiu de la ino nur komence de la 5a monato! Ni rememorigu ankaŭ ke ĉiuj sciencoj atestas ke la unuaj animaloj – kies la homo estas ido – estis kreitaj far la plantoj por permesi al si postvivi. La

*Voltaire, pensisto kaj revoluciulo*

nura destino de l'homo estas do pri-zorgi rozojn...

Se veras ke la inteligento difiniĝas per la adaptada kapablo, ni devas malkontesti ke la simpla roko, la olivarbo kiu vivas dum miljaroj kaj la pogonoforo - mara vermo - kiu vivas 200 000 jarojn, estas multe pli adaptitaj ol la homo tial ke ili postvivis multe pli longe ol ĝi.

*Pri la inteligento de la materio, ni rimarku ankaŭ ke sen la inteligento de niaj ĉeloj, sur kiuj la spirito dirata homa rolas neniel, ni estus malkapablaj postvivi ĉar neniu povas nei ke nia korpo funkcias sen ke ni konsciu ties me anismojn.*

*Kelkaj povus pretendi ke ilia Dio estas inkluzivita en l'Universo kaj ke ĝi (Dio) estas la inteligento de la materio. Sed ni ne konfuzu l'inteligenton kun bono la kaj la malbono tiaj kiaj ili estas difinitaj per la moralo de la mortideva komunulo. Efektive, se la naturo - la materio - estas inteligenta, ĝi kondukas kiel la plimulto de la homoj kaj ĝi estas, en la morala senco, ĉu bona, ĉu malbona, tial ke la faktoj montras al ni ke la evoluado – la trans-formadoj, la kreadoj – efektiviĝas al la eblo, tio estas ĉu al bono ĉu al malbono, sed ne ĉiam al la plejbono.*

*Ĉi ĉio estas tre grave por la diistoj ĉar se Dio ekzistus, kaj do ĝi estus la kreinto de la Universo, ĝi (Dio) estus la sola respondeculo:*

- de AIDESO kaj de la mutacio kiu kondukas al la mongolismo,
- de la malsategoj kiuj mortigas dek milionojn da homoj ĉiun jaron,
- de la 1 800 000 infanoj kiuj mortas ĉiun jaron far la morbito,
- de la 1 700 000 mortoj de homoj ŝuldataj nur al la tertremoj okazintaj ekde 1900. Ktp.

*Finfine, kaj estas la plej terura, se Dio ekzistus, ĝi estus la kreinto, kaj do la ununura respondeculo de la principo kiu devigas nin ĉiuj mortigi por postvivi aŭ pli bone vivi, kio estigas miliardojn da krimoj ĉiusekunde. Tiu evidento ebligas aserti, sen bezono de alia, ke Dio estus la plej granda krimulo ĉiutempe*

*kaj ke ĉiuj, kiuj ĝin kultas, apologias, vole nevole, la krimon.*

*Ni rememorigu tiun penson de Petro Deproĝa (Pierre Desproges): La katolikoj estas monoteistaj, la protestantoj kredas je sola Dio, la muzulmanoj je unika Dio, la judoj je ekskluziva Dio. Kaj kiel sekvo de tiuj malsamaj, ili ne ĉesis sin interbuĉi kaj mortigi aliajn por serĉi imponi iliajn viziojn kaj do malpermesi ĉian liberecon de konscio. Jes, la religioj – oni kalkulas tiutage 30 000 sektojn – estas la majora kaŭzo de la militoj kaj de la mortigoj kiuj ekzistis kaj kiuj ankoraŭ daŭras sur nia planedo. La viktimoj de la atencoj far frenezuloj de Dio en kinoj estas alia pruvo.*

*Se okazis al vi eksponi la supre ditajn faktojn, vi devintis konstati ke ne nur konsiderinda nombro de diistoj malkapablas pravigi sian kredon, sed ili preferas vin kulpigi prefere al akcepti diskuton. Tamen certas ke estas multe pli morala serĉi por defendi siajn ideojn aŭ ilin malvolvi ol imponi ilin perforte. Nu, pormomente, nur la diistoj imponis al mi iliajn vidojn. Tiel unu el miaj fratinoj gilotiniĝis antaŭ 40 jaroj por esti praktikinta abortojn kaj le Conseil de l'ordre (la Konsilejo de ordono) minacis min de interdikto se mi persistus praktikadi aktojn ordonitaj far mia konscienco. Kelkaj min objetos: Estas la leĝo!; jes, sed estas leĝo imponita far la diistaj deputitoj kaj ĝi sufiĉas por montri la manieron en kiu ili mem aŭ iliaj voĉdonantoj konceptas la liberecon de konscio. Pri la abortoj, la moralo de Vatikano certe ne estas universala tial ke la landoj la plej multhoma – ĉinio,*

Bharatio, Singapurio... – estas devigataj malpermesi la gravedojn al la Evoj kiuj tion deziras kaj, dum ties periplo en tiuj tatoj, la papo zorgeme evitis tie kondamni la abortojn. Jes la simpla logiko permesas aserti ke estas morale forigi la fetojn nedezirataj por rajtigi la naskojn de la dezirataj. Plie la faktoj kondukas konsideri ke ĉiuj vivantaj estaĵoj estas fratoj – kio estas la azia filozofio – kaj ke kokido estas pli valora ol embrio, eĉ se ĝi estas nomata homa. Kaj male al la diistoj mi travivas pli da bedaŭro se mi vidas mortigon de kokido ol se mi vidas kuiron de ovo.

Jes, jes, la diistoj pretendas ke estas tiom grave mortigi infanon kiom feton kaj ke ili sentas do la samajn bedaŭrojn dum la morto de fetoto kiom tiu de infano...

Mi aldonas ke malmulte el miaj samgentuloj estas disĉiploj de tiu kiun ili diras esti ilia Dio tial ke la plimulto ne estas cirkumciditaj (la cirkumcido murdas almenaŭ 40 000 infanojn ĉiujare en la tria mondo sekve de tetano!) dum ilia Dio proklamis en la Biblio je la ĉapitro XVII, verso 14 de la Genezo: *La ne-cirkumciditoj ne partaniĝos de mia popolo kaj ili estos ekstermitaj.* La novaj tradukistoj de la Biblio ĝin honte falsaranĝas por ne ŝoki siajn nunajn legantojn. Tiel, en la *Sainte Bible* (Sankta Biblio) eldonita en 1975 kaj enkondukita far Daniel-Ropso (Daniel-Rops), la vorto *ekstermita* de la verso 14 anstataŭitis per la termino *forprenita*.

Rimarko: sekve de la laŭvariea leĝo, ĉiuj transformoj, ĉiuj kreaĵoj – ĉiuj niaj agoj – estas determinitaj far antaŭaj struktureroj. La libereco kaj tio kion ni

nomas *hazardo* do ne ekzistas. Tiu lasta simple rezultatas far la miskono de almenaŭ unu el la kaŭzoj. Tiel aŭtovoja akcidento neniam ŝuldatas al hazardo, sed al multaj faktoroj: horo de la foriro, stato de la aŭtomobilo, de la vojo, ktp.

Por lukti kontraŭ la majora kaŭzo de la murdadoj, vi devas klopodi montradi la malbonfarojn de la religioj kaj esti sufiĉe honesta por ne submetiĝi al la ritoj en kiuj vi ne kredas.

Mi esperas finfine ke ĉiuj estaĵoj kiuj estas al mi karaj neniam estos la adeptoj de iu mistikisto kiu eldiris, tiel Jesuo (Biblio, *La Evangelio laŭ sankta Luko*, ĉapitro XIV, verso 26): *Se iu venas al mi, kaj ne malamas sian patron kaj sian patrinojn kaj sian edzinon kaj siajn infanojn kaj fratojn kaj fratinojn, kaj eĉ ankaŭ sian vivon, li ne povas esti mia disĉiplo.* Ĉu ni devas malpermesi libron kiu publike laŭdegas l'krimon – cirkumcido – kaj la malamon de la familio samtempe estante netolerebla agreso kontraŭ la scienco?

*Martin Lavallée*  
**KANADJO**

*Kio estas religio? venas el paĝo 3-a*

*estas separatistaj, malpermesitaj, kredoj kaj praktikoj kiuj unuigas en sama morala komunumo, nomita Eklezio, ĉiuj tiuj kiuj ĝin aliĝas... La dua elemento kiu enlokigas en nia difino ne estas malpli esenca ol la unua, ĉar, montrante ke la ideo de religio estas nedisigebla de la ideo de Eklezio, antaŭsentendas ke la Religio devas estis*

*Daŭrigo en paĝo 9-a*

## Socia fuŝo aŭ pensakuŝo?: okazo en la vivo de simpla ateisto

de Carlo Nicolodi (Suislando)

Okazis ke antaŭ kelkaj monatoj mia laborkolego petis ke mi partoprenu en funkcio de baptopatro en katolika bapta ceremonio de lia 15-jara filino. Nu, mia unua impulso estis rifuzi tian proponon, sed poste, konsiderinte lian tiklan personan situacion, t.e. vidvo de nur kelkaj jaroj kaj mem nun kancermalsana, mi ne kuraĝis rifuzi lian peton. Li mem ne estis tre kontenta pri tiu antaŭstaranta ceremonio, ĉar li ne estas kredanto kaj evitis ĝis nun altrudi iun religiion al la filino. Sed ŝi, influita de instruistino, decidis nun estiĝi katolikino.

Do, kun ne tro granda entuziasmo mi partoprenis tiun bapтан ceremonion. Akompanis min ankaŭ mia 12-jara filino. Ĉeestis kelkdekoj da personoj, inter kiuj ankaŭ la pia instruistino kun gelernantoj, certe samklasanoj de mia baptofilino. La iom maljuna pastro, laŭ aspekto certe, ano de konservema eklezio, antaŭ ol komenci la ceremonion tedis la ĉeestantajn gejunulojn per enuaj demandoj pri religiaj aferoj. Kiam alvenis vico de mia filino, li demandis, montrinte grandan nigran krucon pendantan sur flanka muro de la kapelo: *Kaj vi, kara filino, pri kio memorigas vin tiu simbolo?* Ŝi, iom embarasita de la solena etoso, helpserĉante rigardis min. Mi tute spontane, preskaŭ sen malico, pritraktante tiun ŝafigan instrumenton, flustris en ŝia orelo: *Vi povus ankaŭ diri: la sankta inkvizicio.* Do, tra la kapelaj muroj antikvaj je jarcentoj eĥis sonora voĉeto dirante, preskaŭ fiere: *Tiu*

*simbolo memorigas min pri la sankta inkvizicio.* La pastro, post eternaj sekundoj de embarasa silento, kun amara rideto, minacante per la fingro, eldiris: *Aj, aj, vi friponetulino, Jesuo mortis ankaŭ por vi kaj POR VIA PATRO.* Dirinte ĉi tiujn lastajn vortojn, li fulmotondris al mi per okuloj. Feliĉe, li tuj ĉesis la demandadon kaj ekkomencis per ŝamanismaj ritoj la baptheadon. Dume, en la malantaŭa benko, mi aŭdis sufiĉe laŭtan voĉeton de 5-6-jara knabeto, kiu demandis al patrino: *Panjo, kio estas tiu sankta 'inkvizanco'? – Ŝŝ... ne ĝenu ... silentu ... – Sed ..., protestis la knabo. Mi diris, silentu!, ordonis la patrino.*

Post la ceremonio, ekster la preĝejo, la sama patrino preterirante min eksplodis: *Ĉu vi ne hontas tiel aĉe influi vian infanon?! – Mi ne konscias pri kio, sinjorino, mi balbutis. Sed daŭrigi la konversacion ne plu interesis ŝin kaj ŝi foriris. Post kelkaj metroj oni reaŭdis knaban voĉeton kiu turmentis la patrino: Panjo, pro kio devas honti tiu viro kaj finfine diru al mi, kio estas tiu sankta 'inkvoizenco'?*

Espereble, tiu knabo en sia vivo neniam rezignos starigi demandojn. Reveturante hejmen, mia filino diris: *Paĉjo, mi suspektas ke vi ankoraŭ foje faris ian vian friponaĵon. – Sen intenco, Sandra, tute sen intenco.*





**Kio estas religio? venas el paĝo 7-a**

*afero eminente kolektiva>> (2).*

*Tiuj difinoj havas la grandan avantaĝon limigi la problemon, permesante tiele eviti domaĝajn konfuzojn. Ĉiu diskuto estus malfekunda se ni nomus, miaj kontraŭantoj kaj mi, malsamajn ideojn per la sama vorto. Mi al neniu volas trudi tiujn difinojn, memkompreneblas, kaj mi min limigos ilin proponi, en la espero igi la diskuton pli klara kaj pli facila. Mi cetere restas je la dispono de kiu ajn min alportus alian difinon por ĝin ekzameni kaj ĝin kritiki kun li.*

*Oni min objektis, multajn fojojn, ke endas distingi inter la revelaciita kaj dogma religio kaj la spontana kaj dogme <<natura>> religio. La distingo estas delikata, ĉar tiu pseŭdo-natura religio estas ĝenerale multe malpreciza kaj sin intermikŝas en mistikismo pure sentimenta kun la religio. Kiam tiu spirita stato enhavas minimumon da dogmoj (kaj de gestoj korespondaj), ĝi povas esti konsiderita kiel stato de religia spirito. Sed en la mala kazo, tio estas en la hipotezo de religio sen iu ajn supernatura kredo fiksa kaj sen iu speciala maniero esti kaj vivi, antaŭ la dirita kredo, ni estimas ke temas pri filozofio, metafizika aŭ ne, kaj ne pri vera religio.*

*Cetere, kiam oni ekzamenas la konsistigajn elementojn de la laŭdiraj <<naturaj religioj>> laŭdegigitaj far sendependaj filozofoj kaj pensuloj, oni ekvidas ke tiuj elementoj pruntitas el la komuna lernaĵo de la grandaj revelaciitaj religioj. Kredo en la supera Estaĵo, en la senmorteco de la animo, en la estonta vivo, tiaj estas tiuj elementoj, pli-malpli purigitaj kaj dolĉigitaj nudigitaj de iliaj superstiĉaj kaj fetiĉaj aparatoj - sed ĉiam samaj en ilia origino kaj ilia celeco.*

*La revelaciitaj religioj malvaste subordigas la homon al la diaĵo. <<La homo kreitis por laŭdi, honori, kaj servi Dion, nian Sinjoron, kaj per tiu maniero savi sian animon>> (1).*

*Ĉar Dio nin faris kaj konsekvence li estas nia majstro kaj ni al li integre apartenas. Ne plu temos, por la individuo, forĝi al si personan religian koncepton, sed akcepti la dogmojn kiujn estos al li imponitaj (malnovtempe per la malmildego kaj la perforto, hodiaŭ ankoraŭ per morala aŭtoritato kaj per sugestado faradita ekde la junaĝo).*

*(1) Lojolo (Loyola), **Ejercicios espirituales**, Spirititaj ekzercoj, p.28*

**MASKOJ FALIS**

*de Atanasije Marjanoviĉ (eks-Jugoslavio)*

*Iliaj maskoj estis belegaj, kun serenhumanaĵ ridetoj, kun veramemaj mienoj, kun okuloj de homa amikeco.*

*Sed maskoj nun estas falintaj; aperis originalaj vizaĝoj, tiuj samteruraj vizaĝoj kiuj jarcentoble turmentas homaron.*

*Frenezigiĝinte pro grandaj potencoj, potenco de armiloj, de mono kaj mensogoj, el ili brilege radias agreso pro forrabo.*

*Al malamo al ni ili stimulus fratojn, alverŝadi armilojn, monon, kaj mensogojn, ja denove kreas novan mondsistemon, sistemon de forrabo kaj regado.*

*Per ruzoj super UN ekreĝis ili. kaj ekpluvegas multaj decidoj kontraŭ Jugoslavio kaj Serbio ... Sojle de jarcent' dudekunua!*

*Historiajn instruojn ili ne perceptis, ja tial formovu ilin de sceno, per nia tenemo kaj voĉdono, ni ordinaraj homoj de nia bela mondo.*

## Kontraŭ Eklezio!

En Tel-Avivo, antaŭ unu jaro, ni decidis revivigi ATEOn relanĉante *Ateismon*, kaj tiucele mi ofertis mian laboron kiel redaktoron. Mi avertis, ke pro miaj devoj kiel redaktoro de **Kajeroj el la Sudo**, mi ne povas redakti artikolojn por nia magazino, sed mi kunpaŝigu kaj organizu la enhavon. Mi eĉ povas selekti artikolojn, se estas manko da spaco en la revuo.

Bedaŭrinde, la solaj artikolojn, kiujn mi havas por komposti la magazinon, estas tiuj malnovaj senditaj al mi de la antaŭa ridaktoro, Ralph Dumain.

Alia problemo estas mona: mi ne povas peti afrankrabaton, ĉar mankas al mi oficialaj dokumentoj de ATEO. Se estus ĝi nova magazino (tiucele mi proponis *Libera Penso*), mi povus peti ĝin kiel individuo. Sed se oni postulas, ke oni **daŭrigu** la publikigadon de **Ateismo**, mi ne povas peti rabaton pri numero 155-an! La sola solvo, kiun mi trovas, estas disdono de la magazino en la universala Kongreso en Kroatio.

Tamen, la unua problemo daŭras: kiu estu las sinteno? Ĉu mi mem devas krei kriterion por elekto de artikoloj? Ĉu mi iĝu la ideologo de ATEO? Ĉu mi mem estu la episkopo aŭ gvidanto de ateistoj? Tio, laŭ mi, sensenĉavigas la asocion. Ne estas utile havi asocion negativan, nur por ataki religion kaj ekleziojn. Ni ateistoj kredas, ke nia opinio plirajtas al tiu de religianoj, ĉar ni havas etikon anstataŭ moralon, ni sekvas racion anstataŭ blindan fidon, ni amas homaron

anstataŭ neigi ĝin, ni alte taksas tion, kio ni estas, anstataŭ malestimigi ĝin.

Sed, male al kristanoj, oni multe pigras ĉe ni. Verŝajne ĉe ateistoj oni atingis tiun staton de nekredemo post natura evoluo, sen tio, ke aparta sperto aŭ traŭmo okazis. Mi ne povas kompreni tion. Sedante la kazon pri eks-komunismaj landoj, oni kreskis en socio, kie unu aŭ alia religio premis la popolon. Individuo ne gravas, sed nur por glorigi Dion. Por forskui tiun mantelon religion de nia konscio, oni certe travivis apartan sperton aŭ pensfadenon. Tio estas mia propono: oni sendu al mi –por publikigo en *Ateismo*– respondon al tiu demando: *kiel kaj kial vi iĝis ateisto?*

Ĉar mi diris antaŭe, ke mi ne volas esti via episkopo aŭ papo, mi esperas kritikon vian al tiu ĉi artikolo. Miaj ideoj povas esti geniaj, sed mi estas la unua persono, kiu dubas tion. Ni ne faru novan eklezion. Malmankas ili ĉiuj, kaj ne helpas krei novan...

Maleklezie via,

*Jesuso.*



## **La celoj de ATEO**

ATEISTA TUTMONDA ESPERANTISTA ORGANIZO

- 1 Kunligi esperantistajn ateistojn kaj liberpensulojn.
- 2 Disvastigi Esperanton inter ateistoj.
- 3 Defendi propran egalrajtecon kaj kontraŭi trudadon de religio en neŭtralajn Esperanto-grupojn.
- 4 Instigi ĉe neŭtralaj Esperanto-grupoj, ke oni egale varbu por Esperanto ĉe nereligiaj grupoj se oni varbas ĉe religiaj grupoj.
- 5 Akceli racian pensmanieron en Esperantujo kaj pri Esperanto mem kaj strebi altigi la intelektan kaj kulturan nivelon de Esperantujo.
- 6 Libere diskuti kaj analizi ateismajn movadojn, politikojn, kaj filozofiojn kaj ĉiajn rilatajn sociajn problemojn.
- 7 Malkateni la mensojn!

# Ateismo

## Organo de ATEO

REDAKCIO: **Poŝtkesto 4461,  
E30080 MURCIA,  
HISPANIO**

**Retskribu al  
jesuo@ono.com**

### GRAVAJ NOTOJ:

- 1 Ne subskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.
- 2 Oni **povas reprodukti** artikolojn, kondiĉe ke oni **citu la originon**.
- 3 Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj. Tamen, ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo estas interesa kaj ne mis-traktas iun ajn personon.
- 4 Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem, ne la redakcio.

*Prezidanto:* **Ralph Dumain**

*Vizprezidanto:* **Claude Nourmont**, el  
Luksemburgio.

Sekretario: **Helga Rapley**, el Francio.  
Kasisto: **Dieter Rooke**, el Svislando.  
Helpanto

pri specifaj taskoj: **Anna Lowenstein**,  
el Italio.

*Redaktoro:* **Jesuo de las Heras**, el  
Hispanio.

**Kovrilo:** *Tia ŝajnas esti la vera  
visaĝo de historia Jesuo de  
Nazareto. Pri kio ajn oni  
mensogis al ni dum 20001  
jaroj?*

